# EKO 2021
## Esperigaj Komunikoj

Je via servo tra ok jaroj, depost 2013

2020: rekorda jaro: kun 60 komunikoj

Subtene al la loka, landa, faka kaj regiona agado

EKO 2021-13 sendita el Budapeŝto la 2an de aprilo.

*Al: Komitato, sekcioj kaj aktivuloj de ILEI, Landaj kaj Fakaj Asocioj de UEA (aliĝintaj kaj ne). Plie al la Komitato, Konsilianoj, regionaj komisionoj de UEA, TEJO-estraro, gazetaro, partoprenintoj en iuj AMO-seminarioj, aliaj listoj kaj unuopuloj. Pli ol 1500 ricevantoj. Kun plusendoj pli ol 2000.*

Por tuja uzo kaj plia diskonigo inkluzive de la alkroĉaĵoj kun indiko de fonto: EKO de ILEI kaj UEA

## AMO 72 – Ŝtopi la digojn

Jen lastaj ĝisdatigoj por tiu seminario pri Aktivula Maturigo.

Temklarigo: Ni trovos la malfortajn punktojn en nia movado, kaj provos kontraŭi ilin.

Tempo: Sabate la 10an de aprilo, ekde 11.00 UTC (13.00 CEST).

Kontribuantoj:

- Stefan MacGill (enkonduko) "Ŝtopi la digojn": laŭregiona analizo de la malfortaj punktoj de nia agado, kune kun laŭregionaj rekomendoj. La prezentaĵo estis dissendita kun EKO 11. Intertempe la enhavo estis kompletigita per aldono de tri mapoj pri la movado en Eŭropo (nun alkroĉitaj).
- Renato Corsetti: 'Kial ni aranĝas ĉi tiun kunvenon? Kion signifas esti esperantisto?' Niaj motivigoj depost 1905.
- Jeremie Sabiyumva (estrarano respondeca pri la AMO-programo): 'La sekvoj de la pandemio al la Afrika Movado'.
- Rodica Todor (prezidanto de nia fervojista Federacio IFEF): 'IFEF sinprezentas al la mondo per siaj fortoj kaj malfortoj'. Pri fervoja temo ĵus okazis kadre de IRIS (TEJO kaj scienco) paneldiskuto en la 3a de aprilo.

Partoprenintoj de AMO en 2020 ricevos la alirinformojn. Aliaj petu tion de la prizorganto de EKO – vidu la adreson fine. La programo enhavos spacon por diskuto aŭ forumo. Ni volas havi reprezentantojn de tiom da regionoj aŭ fakoj, kiom eblas.

**Servo subtenata de Universala Esperanto-Asocio kaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj**

ILEI

Redaktoroj:
Stefan MacGill kaj Mirejo Grosjean



**ENHAVO**


- AMO 72
- IKEF konigas sin
- Fondaĵo Canuto
- Junula Konkurso
- Araba vikipedio
- Litova kurso

## Niaj komercemuloj en IKEF vaste konigas sin

Ĉiudimanĉe nia komercista faka federacio IKEF okazigas retkunsidon kun vasta partoprenantaro (la lasta kun homoj el 27 landoj).

Informoj de IKEF estas legeblaj ĉe:

- Hejmpaĝo https://ikef.info;
- Google-grupo "Komerco"
- Wechat-grupoj: "Monda komerco" kaj "Monda turismo".Facebook-paĝoj: "IKEF Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio" kaj "Komerco"
- Facebook-grupoj: "Komerco helpe de Esperanto" kaj "Ekonomia Esperantismo"
- Facebook-paĝoj: "IKEF Internacia Komerca kaj Ekonomia Federacio" kaj "Komerco".

## Fondaĵo Canuto por 2021

Hieraŭ pasis la 31a de marto, kiu markas la fermon de la unua jarkvarono. Tempo resumi la progreson de la membraro de UEA kaj la Fondaĵo, kiu subtenas tiujn kun pagaj aŭ transpagaj obstakloj.

Jen la stato de FC por 2021 je la fino de 31a de marto 2021: **sume 355 en 68 landoj.**

**Afriko (subsahara): 128 membroj en 25 landoj**

Angolo 1, Benino 17, Burkino 1, Burundo 8, Ĉado 3, Eburbordo 3, Etiopio 2, Ganao 2, Kameruno 2, Kenjo 3, Komoroj 1, Kongo DR 35, Madagaskaro 3, Malio 1, Niĝero 1, Niĝerio 1, Ruando 2, Senegalo 6, Sud-Afriko 2, Tanzanio 6, Togolando 14.

**Ameriko: 61 membroj en 10 landoj**

Argentino 8, Brazilo 7, Ĉilio 2, Gvatemalo 1, Honduro 1, Kolombio 4, Kubo 19, Meksiko 15, Nikaragvo 2, Venezuelo 2.

**Azio: 78 membroj en 13 landoj**

Filipinoj 16, Hinda Unio (Barato) 7, Indonezio 8, Irano 5, Kamboĝo 1, Kazaĥio 1, Mongolio 2, Nepalo 11, Orienta Timoro 3, Pakistano 16, Tajlando 1, Vjetnamio 7.

**Eŭropo: 71 membroj en 14 landoj**

Albanio 8, Belorusio 1, Bosnio-Hercegovino 8, Britio 1, Bulgario 7, Francio 2, Germanio 1, Hispanio 2, Norda Makedonio 1, Nederlando 1, Rumanio 10, Rusio 18, Serbio 6, Ukrainio 5.

**MONA: 17 en 6 landoj**

Alĝerio 2, Armenio 5, Maroko 1, Palestino 1, Sirio 1, Tunizio 1, Turkio 6.

Ni tre intence uzadas la Fondaĵon por membrigi junulojn, instruistojn kaj virinojn.

La CO pretigis informojn pri la membrokategorioj por la subtenado:

| Kategorio | 2019 | 2020 |
|---|---|---|
| Membro kun presita revuo (MA) | 120 | 120 |
| Membro Juna kun presita revuo (MAT) | 26 | 30 |
| Membro baza (reta revuo) | 191 | 230 |
| Membro Juna baza kun reta revuo | 126 | 151 |
| **SUME** | **481** | **492** |

## Junulara Konkurso Grabowski

La juĝkomisiono Grabowski anoncas specialan konkurson por gejunuloj kun la temo 'La dudekaj jaroj, alia mondo?'. Povas partopreni ĉiu homo, kies aĝo ne superas 25 jarojn en la 1-a de januaro 2021. Konkursaĵoj povas esti literaturaj tekstoj de ajna ĝenro (poezio, prozo, dramo, eseo, k.a.) kaj longo, neniam antaŭe publikigitaj en ajna formo. La komisiono povas aljuĝi unuan premion de 250 eŭroj, duan premion de 150 eŭroj kaj ĝis tri honorajn menciojn. Ĉiu konkursanto povas partopreni per ĝis tri kontribuoj. La konkursaĵoj estu senditaj podofo-formate al la sekretario de la komisiono: komisiono.grabowski@co.uea.org antaŭ la **30-a de septembro 2021**.

## Vikipedia projekto por la araba lingvo

**Bayt Alhikma 2.0** estas projekto celanta riĉigi la arablingvan Vikipedion kaj la araban enhavon enrete. La projekto estis lanĉita de ***Ideas Beyond Borders*** (Ideoj Trans Limoj) situanta en Novjorko kunlabore kun ***I Believe in Science*** (Mi kredas je scienco) fine de 2018.

La projekto *dungas pagitajn partatempajn tradukistojn* por traduki artikolojn el ĉiuj kampoj de la angla Vikipedio al la araba Vikipedio kun speciala fokuso pri sciencaj kaj filozofiaj artikoloj. Fonto kun pli da detaloj en la angla) kaj iom en MOOC [eo] kaj Arablingva vikipedio [eo]

Raporto laŭ la komunikilo: Esperanto Türkiye

## Litovio informadas per la reto

Pasintjare pri retaj lecionoj de Esperanto informis ankaŭ la novaĵretejo Ikimokyklinis.lt :



## Raporto el norda Kroatio



Mi informas ke ni lastatempe filmis 15-minutan TV-elsendon en la regiona TV en urbo Varazdin Vtv, kie mi gastis pri Esperanta temo okaze de apero de mia libro pri Hodler en la kroata, la 17an de marto. Krome en la regiona gazeto Zagorski tjednik aperis tutpaĝa artikolo pri mi surbaze de la ĉapitro el "Abeloj kaj la nevideblo" de la aŭstra verkisto Clemens J. Setz. Simila artikolo aperis en la regiona gazeto "Varaždinske vijesti". La traduko de la ĉapitro Štimec el la libro de Setz aperis en reta revuo ZIN en Istrio.

Spomenka Štimec

## Espermenso strečas sian cerbon reaktivigi sin

En Fejsbuko ESPERMENSO - Esperanto Mensa (simpatiantoj)

https://www.facebook.com/groups/743585999792126/

Kaj en Telegramo.org

t.m/espermenso

@espermenso

## Vokoj el la kosmo (se ne tio, almenaŭ el Danlando)

Pri la enhavo de KOSMOS n-ro 1, 2021

**Simbolo n-ro 26**: La venonta perfekta homregno
**Ole Therkelsen:** La 100-jara naskiĝtago de nia Afero
**Martinus:** Pensoj ĉe la jarŝanĝo
**Martinus:** La venonta perfekta homregno
**Martinus:** Mencioj de Esperanto en Granda Kurso
**Konsilio de la Instituto:** Eo kiel oficiala internacia lingvo de Martinus Instituto
**Ole Therkelsen:** Finevoluinta kaj perfekta internacia lingvo

Retpoŝte vi senpage povas aboni elektronikan version de Eo-Kosmos, sendu peton al la Martinus-Instituto: esperanto@martinus.dk Vi povas malaboni samloke.

========= vortoj: 940 =========

Ĉi tiu komuniko estas disponebla laŭ la permesilo Krea Komunaĵo Atribuite Samkondiĉe 4.0 Tutmonde.
Por pli da informoj vidu ĉe: <https://creativecommons.org/licenses/by-sa/4.0/>.

Aperintaj komunikoj legeblaj kaj elŝuteblaj ĉe: http://aktivulo.net/eo/content/komunikoj-pri-agado. La prezento estas ĝisdata ĝisla fino de marto 2021 (per EKO 2021-12).. Vidu ilin laŭjare, kun klaraj enhavaj indikoj por ĉiu jaro.

**ALDONU VIN:** Skribu al <stefan.macgill<ĉe>gmail.com>. Neniu alira kondiĉo aldone al valida retadreso. Malferma al Aligitaj Membroj, eksmembroj, neniam-membroj, klingonuloj, volapukistoj, atistoj, itistoj, ujistoj, iemuloj, Duolingintoj, ktp.

**SUBTRAHU VIN:** Skribu al la supra adreso. Donu vian nomon, retadreson, landon kaj (se eble) la grupon aŭ kialon por via ĉeesto en la ekspedolistoj.